ANNE FRANK DOMO
Muzeo kun historio.

Anne Frank Domo

Bonvenu en la Anne Frank Domo.
Estas fiksita vojplano tra la domo.
El la novkonstruaĵo vi envenas tra la najbara domo Prinsengracht 265 en la veran kaŝdomon, kie Anne Frank estis dum 25 monatoj kaŝloĝantino kaj skribis sian taglibron. La rakonto estos rakontata konforme al citaĵoj el la taglibro, historiaj dokumentoj, fotoj kaj vidbendoj. Je la fino de la vojplano vi trovas la multkomunikejon, muzekafeon kaj la muzebutikon.

La domo Prinsengracht 263, la kaŝejo de la kaŝloĝantoj, konsistas el du partoj: la antaŭdomo kaj la postdomo. En la antaŭdomo establiĝis entrepreno de Otto Frank, kun en la ternivelo la magazeno kaj supre la kontoroj kaj la magazeno. En la postdomo restis la kaŝloĝantoj.
Post la arestado la kaŝloko estis malplenigita laŭ ordono de la okupantoj.Ĉi tiu loko estas ankoraŭ en aŭtentika stato.
La antaŭdomo estis en 1998 rekonstruita konforme al historiaj fotoj kaj konstruplanoj.
Anne Frank naskiĝis en la germana urbo Frankfurt. En 1933 ekregis la naziisma partio de Hitler. La familio Frank decidis transloĝiĝi al Amsterdam.Tie estis sendanĝere, ĝis Germanio en 1940 okupis Nederlandon.Paŝon post paŝo la nazioj alprenis la judaron al la muro. Je la 6a de julio 1942 Otto kaj Edith Frank kaŝiĝis, kune kun siaj filinoj Margot kaj Anne.
Post unu semajno sekvis Hermann kaj Auguste van Pels kaj ilian filon Peter.
En novembro 1942 Fritz Pfeffer iris tien.
Kontorlaboristoj helpis la kaŝloĝantojn.
La magazenlaboristoj sciis nenion.
Je la 4a de aŭgusto 1944 la kaŝloko estis perfidita.
La kaŝloĝantoj estis deportitaj.
Nur Otto Frank postvivis la detrukampadejojn.

Dum la kaŝperiodo Anne skribis sian taglibron.

Plej granda ĝojo por mi estas ke ĉion kion mi pensas kaj sentas, mi povas almenaŭ noti: sen tio mi certe sufokiĝus!
(La 16an de marto 1944)

En 1947 aperis la unua nederlanda eldono de "La Postdomo". Estas ekde tiam eldonita en pli ol sesdek lingvoj.La originala taglibro estas videbla en la 'Domo'.

Ni esperas ke via vizito restos memoro al la viktimoj de la judo-persekutado dum la Dua Montmilito.

La 11an de aprilo 1944.
Iam ja finiĝos ĉi tiu terura milito, iam ni ja estos denove homoj kaj ne nur Judoj!
Neniam ni povos esti nur nederlandanoj aŭ angloj aŭ reprezentantoj de kiu ajn lando; krom tio ni ĉiam restos judoj, ni devos resti judoj,sed resti tiaj ni ankaŭ volas.

La 9an de julio 1942.
La kaŝejo mem estos en la oficeja domo de Patro.
Por eksteruloj tio estas iom malfacile komprenebla, tial mi klarigos.

Magazeno kaj muelejo de spicaĵoj.

La 11an de julio 1942.
Dumtage ni ĉiam devas iri senbrue kaj mallaŭte paroli, por ke en la magazeno oni ne aŭdu nin.

La objektoj en la vitroŝranko memorigas pri la funkcio de ĉi tiu loko dum la kaŝperiodo:

la entreprenloko de la du firmoj de Otto Frank. Opekta estis ĵeleaĵo por marmelado, kaj estis inter alie enpakita en boteletoj. Gies & Co. faris specialajn spicmiksaĵojn. Sur la stampiloj estas la marko.

Mi opinias ke patro tute ne havas agrablan enterprenon, nenion alian ol ĵeleaĵojn aŭ akran pipron. Se iu estas komercisto pri nutraĵoj, do devas ja esti ankaŭ io por frandi!
(La 4an de marto 1943)

La 11an de julio 1942.
Ni terure timis ke la najbaroj povus aŭdi aŭ vidi nin.

Privatoficejo de Otto Frank

La 11an de julio 1942.
Hieraŭ vespere ni iris kvarope al la privata oficejo
kaj enŝaltis la anglan radiostacion.
Mi terure timis.

Oficejo de Victor Kugler

La 7an de novembro 1942.
Ĵaŭdvespere mi estis malsupre kun Patro kaj laboris en
la oficejo de Kugler pri la debitoraj listoj. Estis malsupre
tre harstarige, kaj mi ĝojis kiam la laboro finiĝis.

Kugler kies la grandega respondeco pri nia okopo kelkfoje superas liajn fortojn kaj li preskaŭ ne povas paroli pro streĉitaj nervoj kaj ekscitiĝo.
(la 26an de majo 1944)

Ĉiun semajnon sinjoro Kugler kunportas la revuon "Cinema & Theater" al mi.
(la 22an de januaro 1944)

En la vitroŝranko: la indentigilo de Victor Kugler, la bilanclibro de Opekta, filmrevuo kiun Victor Kugler kunportis al Anne.

========

Kabineto

La 28an de januaro 1944.
Niaj helpantoj, kiuj ĝis nun helpis nin . Neniam ni aŭdis eĉ unu vorton pri la ĝeno, pri tio ni ja estas certaj.

Oficejo de Miep Gies, Jo Kleiman kaj Bep Voskuijl

La 29an de septembro 1942.
Margot kaj mi elektis la antaŭkontoron kiel plaŭdejon. Sabate posttagmeze tie la kurtenoj estas fermataj, tiam ni nin banas en mallumo, dum tiu kiu ne havas la vicon, rigardas el la fenestro tra fendo en la kurtenoj kaj miras pri la komikaj preterirantoj.

En la vitroŝranko: identigiloj de Miep Gies kaj Bep Voskuijl, la skribmaŝino per kiu Miep laboris. Jo Kleiman estis oficiala en la libro kiel direktoro, laŭ la resumo de la Komerca Ĉambro. Per ĉi tiu li helpis Otto Frank forteni lian enterprenon el la germanaj manoj.

Miep similas al ŝarĝ-azeneto, tiu ja portegas amasegon. Preskaŭ ĉiutage ŝi kunrastas ie iom da legomoj kaj alportas ĉion en grandaj aĉetosakoj sur la biciklo. Ankaŭ Kleiman kaj Bep bone prizorgas nin, eĉ tre bone.
(la 11an de julio 1943 kaj la 26an de majo 1944)

Hieraŭ mi vidis tra la kurteno, du judojn sur la strato. Tio kaŭzis strangan senton, kvazaŭ mi estis perfidanta tiujn homojn kaj nun gvatus ilian pereon.
(la 13an de decembro 1942)

Magazenloko

La 19an de novembro 1942.
Multnombraj amikoj kaj konatoj
estas for,
al terura destino.Vesperon post
vespero la verdaj
aŭ grizaj militaŭtoj ronke preteriras.
Neniu
povas eviti sian sorton se li ne
kaŝiĝas.

La foto sur la fenestro rilatas al razio sur la Geldersekade, la 26an de majo 1943.

En la vitroŝranko esprimoj de la kreskanta juda persekutado en Nederlando:

Juda ŝtelo, kiujn la judoj ekde la 3a de majo 1942 devis porti videble.

Ŝildo 'Malpermesita por Judoj'.

Alvoko pri 'laborigo' en Germanio de la 15a de julio 1942. La alvoko de Margot Frank estis la direkta kaŭzo por la kaŝado.

La bildkarto kiun la familio Frank forsendis je la 6a de julio 1942, al parencoj en Svislando, tio estas la tago de la kaŝado.

Foto de Fritz Pfeffer kune kun lia filo en la jaro 1938. Fritz Pfeffer fuĝas en 1938 el Berlino. Lia filo iras al Anglio. Pfeffer venas kun sia ne-juda fianĉino Charlotte Kaletta al Amsterdam. Li alvenas, kiel la 8a kaŝloĝanto, je la 16a de novembro 1942 en la Postdomo.

Post majo 1940 la tempo pli kaj pli malboniĝis; Unue venis la milito, poste la kapitulaco, la invado de la germanoj, kaj komenciĝis la mizero por ni, judoj. Unu kontraŭjudan leĝon sekvis aliaj kaj nia libereco estis treege limigita. Judoj devas fordoni sian biciklon. Judoj ne rajtas veturi trame. Judoj ne rajtas veni en domojn ĉe kristanoj. Judoj devas frekventi judajn lernejojn kaj tiel plu. Ni ne rajtis fari jen tion jen tion ĉi.
(la 20an de junio 1942)

Koridoro kaj turnŝranko

La 21an de aŭgusto 1942.
Nia kaŝejo fariĝis nur nun vera rifuĝejo. Sinjoro Kugler nome opiniis ke estos pli bone meti ŝrankon antaŭ nian enirpordon. Kiam ni nun deziras iri malsupren, ni devas unue kliniĝi kaj poste salti.

Postdomo
Ĉambro de Otto, Edith kaj Margot Frank

Libro Otto Frank
Patro sidas (kompreneble kun Dickens kaj la vortaro) sur la rando de la kaviĝinta knarlito.
(la 23an de aŭgusto 1943)

Preĝaro Edith Frank
Patrino enmanigis al mi preĝaron. Pro dececo mi legis kelkajn preĝojn en la germana lingvo.
(la 29an de oktobro 1942)

Kurso Margot Frank
La latinaj lecionoj kiujn Margot ensendas estas resendataj, korektitaj de docento. Li certe ĝojas, ke li ekhavis tiel inteligentan lernantinon.
(la 17an de novembro 1943)

La krajonlinioj reproduktas la kreskado de la infanoj dum la kaŝado.
Patrino kaj Margot kune uzis tri subĉemizetojn dum la tuta vintro kaj la miaj estas tiel malgrandaj ke ili eĉ ne atingas mian ventron.
(la 1an de majo 1943)

Mapo de Normandio sur kiu Otto Frank ĝistagigis la almarŝon de la aliancanoj.
'This is D-day' diris je tagmezo la angla radio, la invado komenciĝis! Anglaj paraŝutistaj trupoj surteriĝis sur la francan marbordon. La Postdomo en ekscitiĝo! Ĉu do nun vere alproksimiĝos la longe sopirata liberiĝo?
(la 6an de junio 1944)

Ĉambro de Anne Frank kaj Fritz Pfeffer

Nia ĉambreto estis kun tiuj nudaj muroj ĝis nun tre malriĉa; dank' al Patro, kiu antaŭe jam kunportis mian tutan kolekton da bildkartoj kaj filmsteluloj, mi ŝmiris la tutan muron per gluaĵo kaj peniko kaj faris el la tuta ĉambro unu bildaron. Pro tio ĝi aspektas multe pli gaje.
(la 11an de julio 1942)

Adiaŭletero de Fritz Pfeffer al lia fianĉino Charlotte Kaletta.
Pfeffer skribis ne nur leterojn al sia fianĉino, sed ankaŭ kun diversaj aliaj homoj li korespondis laŭ agrabla maniero.
(la 19an de marto 1943)

========

Lavejo

Margot kaj la patrino estas nervozaj. "Ssst… patro, silentu Otto ssst. Venu ĉi tien nun, vi ne povas forfluigi la akvon. Ŝteliru!" Estas diversaj ekkrioj por la patro en la lavejo. Horbato, duonon post la oka li devas esti en la ĉambro. Ne guto de akvo, ne necesejo, ne iru, ĉiuj silentaj.
(Rakontetlibro, la 6an de aŭgusto 1943)

Ĝenerala loĝĉambro kaj dormĉambro de Hermann kaj Auguste van Pels

Manĝokarto de tagmanĝo en la Postdomo, okaze de la unujara geedziĝo de Jan kaj Miep Gies je la 18a de julio 1942.
Kun limigitaj vivrimedoj la kaŝloĝantoj scias prepari festenon.
Poste la proviantado estis tre malfacila.

Ekde morgaŭ ni havos plu eĉ ne buleton da graso, butero aŭ margarino. Nia hodiaŭa varma manĝo konsistos el mikspotaĵo de krispa brasiko el la konservujo. Nekredeble kiel povas fetori

krispa brasiko de antaŭ verŝajne kelkaj jaroj!
(la 14an de marto 1944)

Lernolibro nederlanda-germana kun subskribo de Auguste van Pels.
La sinjorino faris ĉiajn aferojn samtempe: lerni la nederlandan lingvon el libreto, kirli la supon, atenti la kuiratan viandon, ĝemi kaj plendi pri sia rompiĝinta supra brustoripo.
(la 10an de decembro 1942)

Butikumlisteto por Miep Gies, skribita de Hermann van Pels.
Sinjoro van Pels devenas el la komercistaro pri kolbasoj, viando kaj spicaĵoj. Li deziras fari kolbasojn: sekajn, rostajn kaj gelderlandajn. (speciala viandkolbaso nomita laŭ la provinco Gelderland) En la ĉambro estis nepriskribebla fuŝ-konfuzo.
(la 10an de decembro 1942)

Ĉambro de Peter van Pels

Borsludo.
Hieraŭ oni festis la dek-sesan naskiĝdaton de Peter.Jam je la oka mi iris supren kaj rigardis kun Peter la donacojn. Li ricevis interalie la borsludon, razilon kaj cigaredfajrilon.
(la 9an kaj la 10an de novembro 1942)

Subtegmento de la antaŭdomo

La 9an de oktobro 1942.
La angla radio parolas pri gasmortigado.
Mi estas tute konfuzita.

ARESTADO

La 4an de aŭgusto 1944.
La kaŝiĝejo estas perfidita.
Neniu scias de kiu.

Karl Silberbauer de la 'Sicherheitsdienst' (SD) gvidadas la arestadon, asistita de tri nederlandaj SD-anoj. La ok kaŝloĝantoj kun la helpantoj Jo Kleiman kaj Victor Kugler estas forkondukataj al la SD-malliberejo en la Euterpestraat.

DEPORTADO

Transportlisto de la okdektria kaj lasta transporto de Westerbork al Auschwitz, la 3an de septembro 1944.
Estis 1019 homoj en ĉi tiu trajno, 498 viroj, 442 virinoj kaj 79 infanoj, 549 homoj estis tuj gasmortigitaj ĉe la alveno.

Registraj formularoj de la ok kaŝloĝantoj en la administrado de la Juda Konsilaro en Westerbork.

AUSCHWITZ
Mi ne plu volas paroli pri tio kion mi sentis kiam oni mian familion disirigis ĉe la alveno sur la kajo en Auschwitz.
(Otto Frank, 1979)

Hermann van Pels estas gasmortigita en Auschwitz en septembro aŭ oktobro 1944.

Fritz Pfeffer mortis pro malsano kaj elĉerpo la 20an de decembro 1944 en Neuengamme.

Edith Frank mortis pro malsano kaj elĉerpo je la 6an de januaro 1945 en Auschwitz-Birkenau.

Margot Frank mortis pro tifo kaj malhavo en marto 1945 en Bergen-Belsen.

Anne Frank mortis pro tifo kaj malhavo en marto 1945 en Bergen-Belsen, kelkaj tagoj post Margot.

Auguste van Pels estis transportita de koncentrejo al koncentrejo kaj mortis inter la 9a de aprilo kaj la 8a de majo 1945 en la ĉirkaŭaĵo de Theresienstadt.

Peter van Pels mortis je la 5a de majo 1945 en la malsanbarako de Mauthausen.

Otto Frank postvivas Auschwitz.

La taglibroj

La 11an de majo 1944.

Vi jam longe scias, ke mia plej arda deziro estas ke
mi iam fariĝu ĵurnalistino kaj poste fama verkistino.
Post la milito mi ĉiukaze volas eldoni libron
"La Postdomo".

La taglibropaperoj de Anne restas en la Postdomo kiam la kaŝloĝantoj estas deportataj . La helpantinoj Miep Gies kaj Bep Voskuijl kunportas la plenskribitajn kajerojn kaj pli ol tricent nefiksitajn foliojn. Miep konservas la paperojn kaj transdonas tiujn post la milito al Otto Frank kiam estas certe ke liaj filinoj ne plu vivas.

La unua taglibro de Anne Frank, estis donaco okaze de ŝia dek-tria naskiĝdato.

Mi esperas, ke mi povos al vi ĉion konfidi, kiel mi tion ankoraŭ al neniu povis fari, kaj mi esperas, ke vi estos por mi granda apogo. Anne Frank.
(la 12an de junio 1942)

En la mallonga periodo de la 20a de majo 1944 ĝis la arestado je la 4a de aŭgusto adaptis kaj redaktis Anne Frank sian originan taglibron ĝis 'romano pri la Postdomo', kiun ŝi volas publikigi.

Fine mi komencis kun mia 'Postdomo', en mia kapo tio estas jam preta ĝis plejeble.
(la 20an de majo 1944)

Anne Frank verkis ankaŭ mallongajn rakontojn.

La 25an de marto 1944
Mi volos esti utila aŭ plezura por la homoj. Kaj tial mi
estas tre dankema al Dio ĉar li aldonis al mi ĉe mia naskiĝo
la eblecon por skribi, do por esprimi ĉion kio estas en mi!

Resono de la taglibro

Otto Frank revenis post monatlonga vagado el Auschwitz. Je la 3a de junio 1945 li alvenis en Amsterdam. En leteroj li priskribis la serĉadon al sia familio kaj siajn unuajn reagojn je la taglibro. Por la tajpskribo Otto Frank prenas la taglibrajn paperojn de Anne kiel elirpunkton. Je la 25a de junio 1947 en lia agendaro staras: 'LIBRO'. La unua eldono estas fakto.

Mi ankoraŭ esperas ke mi trovos miajn infanojn.
Otto Frank, la 7an de julio 1945.

Nun mi scias la tutan veron.
Otto Frank, la 27an de julio 1945.

Miaj amikoj saviĝis kelkajn fotojn kaj la taglibron de Anne. Mi prenis tion en miaj manoj, sed mi ankoraŭ ne povis legi ĝin.
Otto Frank, la 26an de aŭgusto 1945.

Unu nura Anne Frank emociigas nin pli ol la sennombraj homoj kiuj tiel suferis kiel ŝi, sed kies bildo restas en la ombro. Eble ankaŭ devis esti: se ni devus kun-suferi la suferon de ĉiuj homoj, ni ne povus vivi.
Primo Levi, verkisto kaj postvivanto de Auschwitz, 1986.

Kelkaj el ni legis 'Anne Frank' sur Robbeninsulo kaj elĉerpis multe da kuraĝo.
Nelson Mandela, prezidento de Sud-Afriko, 1994.

Unu el la plej saĝaj kaj emociaj raportoj el la milito.
Eleanor Roosevelt, fondintino de la 'Universala Klarigo de la Homaj Rajtoj' de 1948.

Anne Frank Fondaĵo

La memoro de Anne Frank estas por la Anne Frank Fondaĵo rekta konekto kun la konceptoj, 'libereco', 'homaj rajtoj' kaj 'demokratio'.

La Anne Frank Fondaĵo volas inspiri, per sia laboro, homojn ĉie sur la tero, sin aktive enmeti pro tio.

Ĉiun jaron sekvas okcent lernejgrupoj edukan programon en la Domo.Oni faras kelktempajn ekspoziciojn pri aktualaj temoj. Oni kompilas edukan materialon pri Anne Frank kaj la dua mondmilito sed ankaŭ pri ekstrema naciismo,antaŭjuĝoj, diskriminacio kaj etna-kultura diverseco. La Anne Frank Fondaĵo sekvas politikan ekstremismon en interna kaj eksteraj landoj.La biblioteka kaj dokumento centro disponas pri unika kolekto da libroj, tondaĵoj kaj vidbendoj.

Plie ĝi ekzercigas kaj konsilas lernejojn, firmojn kaj aliajn organizojn en la tereno de multkultura politiko.
Oni propagandas internacie la edukan mision per eduka materialo kaj vojaĝantaj ekspozicioj. Ĝemelorganizoj laboras en Novjorko, Berlino kaj Londono.

Se vi volas kontribui al kaj esti informita pri la laboro de la fondaĵo, vi povas anonci vin kiel amikon de la Anne Frank Fondaĵo. Ĉiujn jarojn vi ricevos la Anne Frank Magazinon kaj agadraporton.

Anne Frank Fondaĵo
Poŝtfako 730
1000 AS Amsterdam
Nederlando
Tel: +31 (0)20 556 7100
Fakso: +31 (0)20 620 7999
www.annefrank.nl